

Johann Wolfgang von Goethe,

## La rozeto

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

Knabo vidis – jen rozeto  
 Sur la kampo staras;  
 Bela, juna la floreto . . .  
 Vive kuras la knabeto,  
 Ĝojas, miras, flaras.  
 Sur la kampo la rozet'  
 Kiel infanet'.

Knabo diris : « mi eltiros  
 Belulinon mian »;  
 Floro diris : « vi foriros, –  
 Per pikiloj mi disŝiros  
 Tuj la manon vian ».  
 Sur la kampo la rozet'  
 Kiel infanet'.

La sovaĝa knab' ridante  
 La rozeton prenis, –  
 La floreto batalante  
 Sin defendis pikadante,  
 Sed la sorto venis.  
 Sur la kampo la rozet'  
 Kiel infanet'.

...

Johann Wolfgang von Goethe,

## Roz' sur erikejo

*tradukita de Konrad Matheus*

Vidiĝis eta ruĝa roz'  
 de knab', sur erikejo.  
 Ĝi belis en matena ros'.  
 Hastis li al juna ŝos'  
 admiru ĝin kun ĝojego.  
 Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz',  
 roz' sur erikejo.

Diris knab': "Mi rompos vin,  
 rozo sur erikejo."  
 Diris roz': "Dorn' pikos vin,  
 por ke vi ne forgesu min.  
 Al mi ne estu sufero.  
 Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz',  
 roz' sur erikejo.

Kaj knab' sovaĝa romp'is ĝin,  
 rozon sur erikejo.  
 En defend' roz' pikis lin.  
 Sed ve' kaj aĥ' ne helpis ĝin.  
 Venis sort' sen tolero.  
 Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz',  
 roz' sur erikejo.

...

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-1022-2070 (2014-05-23 12:25:14)*

*Tiu ĉi Zamenhova poem-traduko troviĝas en <http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php>.*

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de Konrad Matheus.*

*Arg-1022-2227 (2014-12-17 13:24:53)*

*S-ano Konrad Matheus loĝas en Mühlenweg 20, D-33038 Nieheim, Germanio.*